Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 21-an de novembro 2024 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo.** La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 23-an de oktobro 2024**
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

**3. Norvega Esperantisto kaj la Nacia Biblioteko**
Pro manko de respondo al niaj leteroj Jardar ĵus sendis al la Nacia Biblioteko novan retleteron kun simpligita demando. Se la biblioteko ne akceptos nian proponon, ni subskribu la proponon ricevitan en aprilo, do ni prioritatu liberan aliron al Norvega Esperantisto je iliaj kondiĉoj pri kopirajto. Eventuale ni aldonu noton pri kopirajto en la kolofono de la revuo.

**4. Esperantonia**
Dum sia dektaga restado en Esperantonia Claude interalie ordigadis fruajn jarkolektojn de Norvega Esperantisto. Mankas eldonaĵoj inter 1915 kaj 1920, kiam aperadis komuna revuo de SEF kaj NEL.

Kadre de «Operasjon Dagsverk» la 1-an de novembro Claude laborigis ses junulinojn en Esperantonia. Ili partoprenis la ordigadon de Norvega Esperantisto kaj ricevis praktikan kurseton pri Esperanto.

**5. Peto al Legaco Uhlen**
NEL petos apogon de Legaco Uhlen (ĉ. 6000 kr.) por parte kovri elspezojn de la vojaĝo de Claude al Oslo.

**6. Abonkotizoj por Norvega Esperantisto**
Ni altigu la jaran abonprezon de Norvega Esperantisto de 130 al 160 kronoj.

**7. Eventualaĵoj**
Ni organizu retan landan kunvenon de NEL en majo.

**8. Venonta estrara interkonsiliĝo** okazos ĵaŭdon la 9-an de januaro 2025 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund